653 PREFECTURE D'ALGER
DEPOT LÉGAL

1re Année — Dimanche 20 Août 1905 — N° 11

5 Centimes — LA — 5 Centimoj

ALĜERIA STELO

L'ÉTOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-MENSUEL ★★★ DUONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel		Kosto de la Jara Abono	
Algérie, Tunisie	2 fr. »	Alĝerujo, Tunisujo	2 fr. »
France	2 fr. 50	Francujo	2 fr. 50
Etranger	3 fr. »	Eksterfrancaj landoj	3 fr. »

Les Annonces sont reçues à l'Administration du Journal, 57, rue d'Isly, ALGER. *Prix sur demande*

DIRECTEUR-FONDATEUR **Barthélemy BALS**
ADMINISTRATEUR **Louis LANDES**

La Anoncoj estas ricevataj al la Administracio de la Ĵurnalo, 57, rue d'Isly, ALGER. *Prezoj laŭ peto*

UNIVERSALA KONGRESO ESPERANTISTA

EN BOULOGNE-SUR-MER

La malfermo de la kongreso okazis je la 8-a horo, sabato de 5-an de aŭgusto, ĉe la Teatro, kiu ricevis, por tiu ĉi cirkonstanco, specialan dekoradon.

S-ro Péron, la Boulogne'a urbestro, prezidis. Sur la sceno, estis ankaŭ S-roj D-ro Zamenhof; Billoc, suburbestro; Michaux, prezidanto de la Boulogne'a Grupo; Farjon, prezidanto de la Komerca Ĉambrego; Cart, rektoro de la Akademio de Dijon; Ĝeneralo Libert, ano de l' Instituto; Carlo Bourlet.

Tie estis geesperantistoj el ĉiuj landoj, el ĉiuj aĝoj kaj el ĉiuj klasoj.

Je l' levo de l' kurteno, la urba muzikaro ludis « La Marseillaise », kiun, starinte ĉiuj aŭskultis.

S-ro Péron, la urbestro, faris francan paroladon, dirante, ke, kvankam li ne estas vera esperantisto per lingvo, li kore estas tia.

Poste, S-ro Farjon faris esperantan paroladon, kiun, pro manko da loko, kaj bedaŭrinde, ni ne povas enpresi.

D-ro Zamenhof levĝas siavice, sed pro la aplaŭdoj, kiuj estis kvazaŭ frenezaj, nia estro estis devigita prokrasti iom sian paroladon. Li dankas unue la urbestraro pro la amindeco kiun ili montris por lin akcepti. D-ro Zamenhof neniam forgesos la grandegan afablecon kun kiu oni lin akceptis ĉe Boulogne, kaj li diras, ke li ne dubas pri la fina sukceso de la internacia lingvo, kiu potence kunhelpos al proksimiĝo de l' popoloj, kaj finas sian paroladon per poezio, en kiu li gloras la mondestro, kiu kreis la homaron.

Entuziasmajn aplaŭdojn ricevis la lastaj paroloj de l' doktoro, kaj la unua kunveno finiĝis per belega koncerto, kiu bonege sukcesis.

Dimanĉo la 6-an de aŭgusto, je la 9-a matene, kunvenoj de la kongresanoj laŭ nacioj en la Pumpilista salono por Angloj, en la fiŝvendejo por la Belgoj kaj Holandoj, kaj en la diversaj salonoj de la Urba Teatro por la aliaj kongresanoj.

Oni ekzamenas la diversajn projektojn proponitajn. Elekto de l' paroladontoj, kaj enskribo del' demandoj prezentotaj en la kunveno de lundo matene.

Je la 1-a postagmeze, ekskurso al Aubingues-Wimereux per speciala vagonaro. Ĉeesto senpaga por la kongresanoj ĉe la ĉevalaj kuradoj. Je la 8-a vespere, granda esperantista koncerto en la urba Teatro, kie oni ludis la unuaktan komedion de Molière « Edziĝo kontraŭvola », kiu havis grandegan sukceson.

Lundo, je la 8-a matene, kunveno, en la Urba Teatro, de la aŭtoroj de projektoj de la komisiistoj elektitaj. Post la legado de la verkoj de la delegitoj, D-ro Zamenhof aprobigis la elekton de la vicprezidantoj. Oni aklamis S-ron Boirac, ĝeneralo Sébert, Codorniu (Hispana); Pawlen (Angla); Philips (Germana); Michaux. Poste la kreinto de Esperanto legis longan kaj interesan deklaracion pri la fundamentaj elementoj de la nova lingvo. Tiu deklaracio estis unuvoĉe aprobita. Je la 12-an tagmeze, granda festeno, oferita al D-ro Zamenhof, al la urbestraro kaj al la presaro en la Kazino. En la sama loko okazis, je la 9-a vespere, granda balo kun naciaj aŭ regionaj kostumoj.

Mardo, dua ĝenerala kunveno kaj diskutado pri diversaj aferoj; je la tria postagmeze, vizito de la haveno kaj ekskurso al Le Portel. Je la 9-a vespere, 2-a ĝenerala kunveno kaj laŭvola kaj senprograma koncerteto.

Merkredo, je la 9-a matene, kvara ĝenerala kunveno. Je la 3-a posttagmeze,

voĉdonadoj, decidoj de la kongreso, kaj elekto de la urbo kie okazos la dua kongreso.

S-ro Gaston Moch deziras, ke kongreso okazos ĉiujare, kaj multaj el la ĉeestantoj deziras, ke la proksima kongreso okazos en Anglnjo, kie Esperanto faris grandegajn progresojn.

S-ro Boirac legas gravan deklaracion de D-ro Zamenhof pri la lingvo Esperanto, kiun, bedaŭrinde, ni ne povas enpresi, sed oni povos sendube ĝin legi en aliaj pli gravaj esperantistaj gazetoj. S-ro Boirac, dum parolado tre aplaŭdita, certigas, ke la kongreso en Boulogne estas granda dato en la historio de Esperanto. La parolanto gratulas S-ron Michaux kaj liajn kunlaborantojn, kiujn laboregis por la disvastiĝo de la grandega elpenso de D-ro Zamenhof.

D-ro Zamenhof diras, ke li neniam forgesos tiujn kongrestagojn kiuj neniam foriros el sia memoro, kaj eliras, akompanata de S-ro Michaux.

Ĵaŭdo, je la 12-an tagmeze, la kongresanoj foriris el Boulogne per ŝraŭba vaporŝipo, kaj alvenis ĉe Folkestone, kie ili estis akceptitaj de la Folkestone'a Grupo ĉe Marstacidomo. Oficiala ricevo de la delegitoj de la prezidantoj de esperantistaj societoj kaj de la presaro. Je la 6-a vespere, foriro el Folkestone kaj alveno ĉe Dover.

Vendredo, je la 2-a posttagmeze, alveno ĉe Calais, kaj akceptado de la Calais'a Grupo. Granda vesperfesto en la Kazino. Foriro de Calais kaj realveno en Boulogne.

Dum la tuta daŭro de la kongreso grandan esperantistan ekspozicion okazis en la Urba Teatro de Boulogne.

Ĝenerale, la tuta presaro estis favora al Esperanto. Ni devas citi, precipe, bonegajn artikolojn el « Le Télégramme du Pas-de-Calais », « Le Figaro », « L'Eclair », kaj ankaŭ la tre interesan artikolon de Emile Cherblanc en « Le Journal ».

Al ĉiuj ni diras dankon.

Ni devas gratuli S-ron Michaux, la ageman presidanton de la Boulogne'a Grupo, kaj liajn kunlaborantojn pri la bonega organizo de la kongreso, kaj S-ron Deligny por aranĝo de la ekspozicio esperantista.

Ni frate salutas ĉiujn kongresanojn, kiujn ĉeestis en la Boulogne'a Kongreso, kaj ni sendas al la eminenta kreinto de Esperanto, kies nomo devas esti gravurata per oraj literoj en ĉiuj memoroj, niajn respektegajn memorajoj. Ni respekte nomas Doktoron Ludoviko Zamenhof.

Ludoviko LANDES.

Memorajo de la unua Kongreso de Esperanto

Post la grandega kaj fruktoplena sukceso de la unua Universala Kongreso de Esperanto, multaj esperantistoj demandis ĉu estus eble aĉeti aron da kolektotaj memorajoj pri tiu grava historia okazo. Por kontentigi tiun deziron, estas sendataj al ĉiuj kiuj pagos DU FRANKOJN :

1e KONGRESA LIBRO, de PAUL BOULET. Tiu libro, 164 paĝa, bele eldonita, enhavas multajn ilustrajojn (inter kiuj belan portreton de D-ro Zamenhof kaj artan fotografajon de la profesoroj-komitatanoj de la Grupo de Boulogne), poeziojn de D-ro Zamenhof, interesan gvid-libron enhavantan ĉiujn utilajn sciigojn pri Boulogne, gravan deklaracion kiun D-ro Zamenhof legis dum la kongreso kaj kiun ĉiu esperantisto devas koni, plenan frazlibron francan-esperantan por turistoj kiu enhavas ĉiujn frazojn necesajn dum vojaĝo kaj utilega lernilo kiu tre helpos la praktikan lernadon de nia lingvo.

2e BROŜURO enhavanta la projektojn diskutotajn de la komicio elektita dum la kongreso.

3e ADRESARO de la kongresintoj.

4e DETALA PROGRAMO de la kongresaj festoj.

5e Specimeno de la KARTO DE KONGRESANO.

6e Specimeno de la KONGRESA POŜTKARTO, de S-ro ROLLET DE L'ILE.

7e Diversaj CIRKULEROJ pri la organizacio de la kongreso.

Ni konsilas al ĉiuj kiuj deziras ricevi tiun interesan aron da kongresaj memorajoj, ke ili sendu, KIEL EBLE PLEJ BALDAŬ, sian mendon al S-ro PAUL BOULET, sekretario de la Unua Kongreso de Esperanto, 49, strato Louis-Duflos, Boulogne-sur-Mer (Franclando).

Amuzajoj

Solvo de nia lasta numero problemo :

OKA PROBLEMO :

Restas nenian birdon, la du vivaj rapidege forfluginte. A. BAISSAC.

TIMGAD

ŝEKVO KAJ FINO

Ĉe la momento de nia vizito, aliaj mozaikoj estis pretigitaj por ilia « malalgluo ». Sur la ŝtonplataĵoj de la grandaj varmbanejoj, oni videtas restaĵojn de desegnaĵoj preskaŭ tute malaperintajn.

Oni estas mirigita pro la malmulto da statuoj kaj artaĵoj kolektitaj en Timgad. Oni trovas en la muzeeto aldorsigita al la administracia domo, statuon nomitan de l' Imperiestrino, devenantan de fosoj faritaj en Forum, ĝi estas videbla dekstre de la ĝenerala vidaĵo de l' kolektitaj objektoj.

Oni povas ankaŭ distingi, en la grupo, nedifektitan statueton de Higie. La statuo videbla estas tiu de Sertia Valentina Tucciana, la roma virino kiu donacis, kun sia edzo, vendejon al siaj samurbanoj. Granda vazo estas ornamita per bestoj alkondukataj por la afero.

Oni kolektis antaŭ ne longe, en ruinoj de domo, kvar virinajn kapojn, inter kiuj tri marmoraj ; la kvara, bronza estas specimeno sola, ĝis nun, en Timgad Unu el tiuj kapoj, sendube la reprezentaĵo de la diino estas « gigantа » ; ĝi havas 1 m. 80 cm. ĉirkaŭe kaj 66 cm. alte. Oni ĵus retrovis, samtempe kiam aliaj vidindaj objektoj, belegan Venus'on afroditan, bronzan, tute nedifektitan, kaj dancistinon (Saltatrix), gracie ĉarman, ankaŭ bronzan kaj preskaŭ nedifektitan.

Surprize, oni vidas, ke urbo ne ĉefe grava, « lokita » ĉe l' ekstrema limo de l' Regno, povis akiri post malpli ol du cent jaroj, tiajn konstruaĵajn proporciojn.

S-ro Gaston Boissier al ni klarigas kiel sama fakto povis okazi, ne tro ŝarĝante budĝeton, kies elasteco estis certe malpli granda ol tiu ĉi monaj rimedoj nuntempaj.

Personoj « komisiitaj » por plenumi elektajn oficojn estis devigataj, de uzado, elmontri sian dankecon al siaj samurbanoj, pro honoro al ili farita, de malverecaj agoj. Cetere, la « dekurionoj » kaj aliaj magistratoj deziris daŭrigi la memoron de siaj nomo kaj meritoj.

La epigrafia scienco liveras estimindajn montrojn je tiu vidpunkto, kaj oni vidas virinojn inter la gebonfarintojn de la Urbo.

Traduko de Esperantisto.

Espero Pacifista

Ni ricevis la unuan numeron de « Espero Pacifista », monata organo de la Internacia Societo Esperantista por la Paco.

Ni gratulas nian novan kunfraton, kaj deziras al li grandegan sukceson por ĝia nobla entrepreno.

Dum tiu tempo de militado, la apero de tiu revuo eble tauŭgos por unuigi ĉiujn pacifistojn kaj helpi la tre malfacilan solvon de tiu granda ideo, kiu estas **pace batali.**

Oni sendu kiel eble plej baldaŭ, sian kotizaĵon, se oni deziras ricevi la duan numeron de « Espero Pacifista », kaj la aperontajn aldonojn.

Ni tre plezure ricevos la kotizaĵojn de la Algeriaj Esperantistoj ĉe nia presoficejo, 57, rue d'Isly, Alĝero.

La kotizaĵoj estas po 25 fr. por donaculo ; 10 fr. por propagandulo, kaj 5 fr. por ordinara aliĝanto.

Atesto pri Kapableco

Plezure ni sciiĝas, ke nia amiko, S-ro Bezingé, en Konstantino, ĵus plenumis la ekzamenon por la « atesto pri kapableco ».

Sekve estas nun tri Esperantistoj diplomataj en Alĝerujo kaj ili estas ĉiuj Konstantinaj.

Tio multe honorigas niajn fervorajn amikojn en tiu urbo, tial volonte ilin ĉiujn ni gratulas kaj pli speciale la novan atestiton, nian amikon, S-ro Bezingé.

PRI LA VORTO "ALĜERO"

Ni ricevis el Grafo Albert Gallois, nia tre estimata kunlaboranto, la sekvantajn notojn pri la vorto « Alger » :

« Riolunato, la 26-an de Julio 1905.

« Estimata Direktoro, kaj tre kara Amiko,

« Mi petas vin publiki tiun ĉi leteron en via baldaŭa numero de « Alĝeria Stelo » :

« Mi aprobas vian opinion pri la maniero skribi esperante la francan vorton « Alger » ; tamen, mi opinias ke oni devus ĝin kribi per Ĵ, kiu prononciĝas, kiel J en franca vorto " jour ", kaj ne per Ĝ, kiu prononciĝas DJ, kiel en " Adjudant ", ĉar france oni diras " Aljer " kaj ne " Aldjer " ; mi do opinias ALĴERO anstataŭ ALĜERO. Ĉiumaniere, mi tute preferas ALĜERO anstataŭ ALGERO.

« Same, mi opinias diri Alĵera anstataŭ Alĝeria, sen **i**, ĉar oni diras « Franca Stelo » kaj ne « Francia Stelo » ; efektive " Algérien " estos Alĵera kaj ne Alĵeria.

« Tute via sindonema,

« Grafo Albert Gallois. »

Grafo A. Gallois estas tute prava koncerne la franca elparolado de « Alger », kiu, ni, france elparolas Alĵer ; sed ĉar la franca vorto « Alger » estas malbona elparolado de la araba vorto El-Djezaïr, kiu estas elparolata de la Araboj El-Ĝezair (الجزاير) ni devas traduki per Alĝero kaj ne Alĵero.

Pri la vorto « Alĝeria Stelo », ni komencis titoli nia ĵurnalo « Alĝera Stelo » kiu signifas Stelo de Alĝero, se l, niaj najbaroj el Oran'o aŭ Konstantin'o malkontentigis pri tiu nomo de « Alĝera Stelo », kaj, laŭ klarigoj el Sinjoro Baissac, nia Konstantin'a kunbatalanto, ni decidiĝis skribi « Alĝeria Stelo » anstataŭ Alĝera, tial ke « Alĝeria Stelo » signifas la Stelo de Alĝerio (l'Etoile Algérienne et non Algéroise), tio faras ke ni elektis por nia titolo « LA ALĜERIA STELO ».

Oni ne diras aŭ skribas " Alĝerio " por traduki " Alger ", sed " Alĝero ". Alĝerio, aŭ pli bone Alĝerujo, elmontras la landon mem en kiu la Alĝerianoj loĝadas kaj vivadas, kaj la loĝantoj de Alĝero estas la Alĝeranoj, kiel oni devas diri Parizanoj, k. t. p.

Ludoviko LANDES.

Niaj Protektantaj Abonantoj

Grafo ALBERT GALLOIS, en Riolunato (Italujo).
Sinjoro AUGUSTE BAISSAC, en Konstantino (Alĝerio).

Kun varmaj dankoj.

Grafo GALLOIS, en Riolunato (provinco de Modena) Italujo, deziras ricevi malnovajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Li sendos, interŝange, ĉiujn italajn poŝtmarkojn malnovajn kaj nunajn.

L'INSIGNE espérantiste d'Emile GASSE

Etoile Verte INTERNATIONAL

est en vente dans nos bureaux, 57, rue d'Isly, Alger, au prix de **1** franc ; par poste recommandé, **1** fr. **15.**

Tous les Espérantistes doivent avoir l'**Etoile Verte.**

BONEGA OLIVOLEO EL " PROVENCE "

KAFOJ. - TEOJ. - ORANĜFLORAKVOJ. - PURA SAPO

Firmmarko : **L'Esperanto**

Petu prezarojn, specimenojn. — Speciala rabato al Esperantistoj por ĉiuj senperaj mendoj. — Agentoj akceptataj en ĉiuj landoj. — Skribu : A-te Lanisson, Salon (B.-du-Rhône) Franclando.

Por la Alĝeraj mendoj, turnu vin al S-ro Louis Landes, 57, rue d'Isly, Alger.

Le Gérant : Michel LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accentuées de la Maison Turlot, Chaix et Cie, 128, rue de Rennes, Paris

Michel Lledo Tirage 5000